

# HORIZONTO

V-a JARO N-o 28 (4)  
JULIO - AŬGUSTO 1980

KULTURA KAJ INFORMA REVUO



Vilaĝo "Le Bonhomme"  
(700 m. - Alta Rejno)

PLU AKTUALA HISTORIA DOKUMENTO

STRANGA LOGIKO

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

# HORIZONTO

Direktorino  
Inés Gastón

Redakta Komitato  
Salvador Gumá  
Juan Régulo  
Jean Thierry

Red. kaj Adm.  
Inés Gastón  
P.º de la Constitución, 35  
Telf. (976) 22.05.21  
Zaragoza-1 (Hispanujo)

Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj  
Dumonata revuo  
Presita en Zaragoza  
ĉe "Tipografía C. Boloix"  
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8  
Leĝa Depono Z-133-76

N.º 4 - Julio - Aŭgusto 1980

## E N H A V O

HEINRICH MÜLLER (Helmut Sonnabend)

PLU AKTUALA HISTORIA DOKUMENTO: (Ivo Lapenna)

NEFERMITA LETERO AL J. V. STALIN

PRI LA INTERNACIA KOMERCA - EKONOMIKA VORTARO EN 9 LINGVOJ (F. Munniksma)

DANKESPRIMO  
BELETRO

Stranga Logiko (trad. S. Gumá)

x  
x x

Borde

Forstrekita

Kanto Kvin (trad. Liven Dek)

LA ARTO EN LA TAŬROLODOJ KAJ LA SCIENCO EN LA FUTBALO (Inés Gastón)

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED) Redaktas (Ivo Lapenna)

KION VI NE LEGOS ALILOKE

Neobjektiva recenzo plena de eraroj kaj antaŭjuĝoj (Ivo Lapenna)

MALLONGE

EL NIAJ ORGANIZAJOJ Raportas (Red.)  
INTERNACIA KIBERNETIKA ASOCIO  
Informoj pri la IX-a Internacia Kongreso  
VI-a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

## KIEL ABONI

Abonojn al «Horizonto» akceptas la administracio: Inés Gastón, Paseo de la Constitución, 35, Zaragoza-1, Hispanujo. Pĝk. Zaragoza 00428398. (Jarabono por Hispanujo kaj Portugalujo 600 ptoj., por eksterlando 700 ptoj. aŭ 12 usonaj dolaroj), aŭ la sekvantaj.

## PERANTOJ

Aŭstrujo:

Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 GRAZ. Pĝk. Graz 1257.845. Jarabono: 160,— S.

Britujo:

Geoffrey King, 14 Elmdale Road, LONDON N13 4UL. Pĝk. 37.507.9106. Jarabono: 7 £.

Danlando:

Peter Zacho, Nørregardsvej 91, DK-2610 RØDOVRE, Pĝk. 6287859. Jarabono: 70,— D Kr.

Finlando:

Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101 KUOPIO 10, Pĝk. KU 152801-5. Jarabono: 50,— F. Mk.

Francujo:

André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle, F-75018 PARIS. Pĝk. Paris 21.670.96 V. Jarabono: 50,— Fr.

FR Germanujo:

Rudolf Helmke, Wiesenstrasse 9, D-4773 MÖHNESEE-GÜNNE. Konto-Nr. 31 377 450 Sparkasse Möhnese (BLZ 414 514 85). Jarabono: 24,— DM.

Grekujo:

Adda Sakelaropoulou, Sokratous 88 Omonia, ATHENO 101. Jarabono: 380,— Grekaj Drakmoj.

Israelo:

Ben-Alter Jehiel, P. O. B. 379, PETAH TIKVA. Pĝk. Bank Hadoar, 4-45854-8. Jarabono:

Jugoslavio:

D-ro Oton Pancer, Voćarsko Naselje 10, YU-41000 ZAGREB. Jarabono: 216 n. din.

Kanado:

Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO Ont. M4S 2V2. Jarabono: 14,— \$.


Luksemburgo:

Wickler Albert, OLM. Pĝk. 54175-49. Jarabono: 380 lfr.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel perantoj, bv. sin turni al la direktorino.

## PLEJ GRAVAJ VERKOJ

Eldonejo: PLAZA & JANES, S. A.  
ESPLUGAS DE LLOBREGAT  
(Barcelona - Hispanujo)



*Heinrich  
Müller*

Multe fari  
malmulte sinprezenti  
pli esti ol ŝajni

Heinrich Müller ne plu estas inter ni.  
Li mortis la 15-an de Aprilo 1980.  
Riĉa, plenkreiva vivo ne nur finiĝis,  
sed ankaŭ ideale perfektigis.

Li aspektis por siaj geamikoj kiel eterne  
juna, kvankam li jam naskiĝis la 24-an  
de Novembro 1901. Ni, kiuj estas pli junaj  
ol li neniam sentis aĝan diferencon inter  
li kaj ni. Li vigle interesiĝis pri ĉio,  
kio facetas la homan vivon.

Heinrich Müller jam konatiĝis kun Esperanto  
en la jaro 1932 en Danujo, kiam li renkon-  
tiĝis kun sinjoro Fries kaj ekde tiam li  
estis konvinkita pri la valoro de unueca  
lingvo.

Sed unue post la dua mondmilito ebligis al  
li la nova demokrata ŝtato sinokupi pri  
Esperanto. Li vidis la grandan ŝancon pere  
de la zamenhofa Esperanto kunigi la homojn.  
Kaj li iris tute praktikan vojon laŭ la  
moto ne paroli pri Esperanto sed agi por ĝi  
En Malsupra-Sakcio li baldaŭ fariĝis en

ministerio pri kulturaj kaj edukaj aferoj tre konata persono. Kiel li amis la rektan metodon instrui Esperanton, tiel li uzis ankaŭ la rektan vojon: li ne skribis al la ministerio, li vizitis — plurfoje — la ministrojn aŭ la koncernajn sinjorojn por buŝe prezenti siajn dezirojn.

La rezulto estis, ke la unuaj porinstruistaj Esperantokursoj okazis en Malsupra-Sakcio, aprobitaj kaj pagitaj fare de la ministerio. Multajn kursojn li tiel organizis, kaj multaj instruistoj esperantiĝis nur pro la laboro de Heinrich Müller, kiel ankaŭ la subskribinto.

Lia sukcesa sekreto estis, ke li same kiel la ministrojn, li rekte parolis kun la instruistoj konvinkante ilin viziti la kursojn. Heinrich Müller plue sukcesis ligi la de li esperantigitajn instruistojn en la unua instruista Esperanto-organizo de Germanujo post la dua mondmilito: li fondis EUGI, t.e. Esperanto Unuiĝo de Germanaj Instruistoj, nuntempe AGEI.

Sed ne nur en Malsupra-Sakcio Heinrich Müller pruvis sian sindonan, nelacigeblan laborforton, li ankaŭ internacie estis konata. Eble li estis la unua germana esperantisto invitita de la danoj al Danujo kaj estas multaj, kiuj dum postaj jaroj lernis tie en la feria altlernejo pere de li Esperanton.

Estis la sincera, honesta karaktero kaj lia veroama, komprenema sinteno, ke multaj Esperantistoj estimis kaj amis lin.

Li abomenis fintajn agadojn. Hamburgo 1974, la eventoj tie decidigis lin kiel multajn aliajn sincerajn esperantistojn ekŝiĝi el UEA kaj aligi sin al la Neŭtrala Esperanto-Movado, kies celoj estis la liaj. Gis lia ekŝiĝanta malsano li estis la peranto por «Horizonto».

Heinrich Müller nomis sin esperantisto. Mi opinias: Heinrich Müller estis Esperantisto.

*Helmut Sonnabend*

NEFERMITA LETERO AL J. V. STALIN

En majo 1952 la Estraro de UEA kaj la Plenumkomitato de SAT decidis samtempe publikigi en siaj respektivaj organoj Nefermitan Leteron al J. V. Stalin. La Letero estis iniciatita kaj verkita de la subskribinto, tiama estrarano de UEA pri informado kaj honorofica direktoro de la ĵus fondita Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED). Ĝi aperis en la ĵurniaj numeroj (1952) de *Esperanto* kaj *Sennaciulo*, kaj estis publikigita ankaŭ kiel dokumento A/VI/3 en la Internacia, franca kaj angla lingvoj. El tiu dokumento ĝi estis represita, ĉu komplete, ĉu parte, en pluraj anglaj kaj francaj gazetoj, interalie en la internacie tre prestiĝa *Le Monde* (Parizo), dum aliaj nacilingvaj gazetoj publikigis tradukojn aŭ favorajn komentojn. La enhavo elvokis grandan interesiĝon kun multaj pozitivaj eĥoj. Ĝi estis unu el la tute komencaj atingoj de CED, fondita la 1-an de januaro 1952 ne por ludadi «interlingvistikismon» kaj «planlingvismon», sed por pleddadi klare kaj senkompromise, surbaze de faktoj kaj sciencaj argumentoj, por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj per la Internacia Lingvo (Esperanto), laŭ siaj strukturo, celo kaj konsisto de la parolantoj la sola vere internacia vivanta lingvo.

En *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo* U. Lins skribis en ligo kun la sovetisma-stalinisma kampanjo kontraŭ «kosmopolitismo» kaj la reago de UEA-SAT en la menciita Letero: «Okaze de tio solidariĝis — per unika faro — la Plenumkomitato de SAT kaj la Estraro de UEA por protesti en Nefermita Letero al Stalin kontraŭ ties lingvistikaj teorioj» (p. 655). Aliloke li skribis:

«La kernon de la problemaro rilata al la subpremo de Esperanto en USSR kaj en la landoj de ĝiaj aliancanoj trafis la Estraro de UEA kaj la Plenumkomitato de SAT, kiuj per komuna Nefermita Letero al Stalin (majo 1952) nete atribuis la kontraŭesperantan politikon de Soveta Unio al lingva imperiismo. Citante eldirojn de sovetaj lingvistoj, la Letero trafe atentigis pri la kontraŭdiro inter la profetaĵoj pri kunfandiĝo de lingvoj kaj nacioj, unuflanke, kaj la praktika utiligo de la rusa kiel sola internacia lingvo, aliflanke, kaj, krome, inter la neo de klasa karaktero de la lingvo kaj la implicita postulo, ke internacia lingvo devas atendi novan bazon aŭ superstrukturon por formiĝi kaj ekesti» (p. 742; la interesiĝantoj, pri la persekutoj de Esperanto kaj de esperantistoj en Soveta Unio devus legi aŭ relegi la tutan ĉap. 21.4 de *EeP*).

En la nuna situacio en la Esperanto-Movado la Nefermita Letero bedaŭrinde plu estas aktuala, eble eĉ pli aktuala ol en la tempo, kiam ĝi estis verkita. Tial, por kompletigi miajn analizojn kaj komentojn pri *Socipolitikaj Aspektoj*, kiel ankaŭ pro la fakto, ke post 1952 la Letero laŭ nia scio estis nenie represita, ni sube publikigas ĝian kompletan tekston.

Ivo Lapenna

Nefermita letero

Al J. V. Stalin,

Moskvo

En la diskuto pri lingvistiko, meze de 1950, vi intervenis per unu artikolo kaj kelkaj leteroj, kiuj estis presitaj en «*Pravda*» kaj poste represitaj en «*Bolŝevik*».

La lastan el la leteroj, tiun de la 28-a de Julio 1950, vi dediĉis al la demando de internacia lingvo. En ĝi vi diris:

«Rilate la alian formulon de Stalin, prenitajn el la parolado ĉe la XVI partia kongreso, en la parto, kiu koncernas la kunfandiĝon de la lingvoj en unu komunan lingvon, ĉi tie estis pensate al alia epoko, nome al epoko post la venko de socialismo en mondaj kadroj (substrekiĝis J.V.S.), kiam ne plu ekzistos mondimperialismo... kiam la egaleco de la nacioj realiĝos, kiam la politiko de subpremo kaj asimilado de la lingvoj estos likvidita... kaj la naciaj lingvoj havos la eblecon libere riĉigadi unu la alian sur la vojo de kunlaborado... Ĉi tie temos ne pri du lingvoj, el kiuj unu suferas malvenkon kaj la alia eliras el la batalo kiel venkinto, sed pri centoj da naciaj lingvoj, el kiuj, rezulte de longa ekono-

*mia, politika kaj kultura kunlaborado de la nacioj, unue elstaros la plej riĉigitaj unuecaj zonaj (regionaj) lingvoj, kaj poste la zonaj lingvoj kunfandiĝos en unu komunan lingvon, kiu, kompreneble, estos nek la germana, nek la rusa, nek la angla, sed nova lingvo, kiu estos kolektinta en si la plej bonajn elementojn de la naciaj kaj zonaj lingvoj»<sup>1</sup>.*

Niaj asocioj ne deziras esprimi sian opinion pri la politika aspekto de viaj asertoj, precipe ne pri la «venko de socialismo en mondaj kadroj», pri la enhavo mem de la koncepto «socialismo» aŭ pri la formoj de internaciaj rilatoj en la du partoj de la hodiaŭa mondo. Nin ankaŭ ne koncernas via starpunkto pri diversaj lingvaj demandoj, kiujn vi tuŝis en la artikolo kaj en la leteroj. Sed koncerne vian starpunkton rilate al la Internacia Lingvo, ni konsideras kiel nian devon doni al vi kompetentan, koncizan respondon, des pli, ke en la lastaj monatoj ni havis la okazon konstati la negativan efikon de via letero por la plua disvastigo de Esperanto en kelkaj landoj:

(1) El via letero de la 28-a de Julio klare sekvas, ke vi ne nur neas la ekziston de la Internacia Lingvo, sed eĉ la nuran eblecon de ĝia ekzisto en la nuntempo.

Tiu via inkluzivita aserto estas kontraŭa al la realaĵo, ĉar la Internacia Lingvo Esperanto — kun centmiloj da personoj, kiuj ĝin uzis en la lastaj jardekoj kaj uzas hodiaŭ, kun sia riĉa originala kaj traduka literaturo, sia gazetaro, radiclesendoj, kongresoj, konferencoj, larĝa korespondado ktp. — ekzistas kaj funkcias praktike jam 65 jarojn, malgraŭ la fakto, ke ĝin malpermesis la cara registaro en Rusujo kaj Hitler en Germanujo, dum aliaj diktatorecaj, ŝovinismaj reĝimoj malfavoris kaj malfavoras ĝin.

(2) Teorie vi ligas la formiĝon kaj la ekeston de internacia lingvo kun la ekonomia, socia, politika, jura ordo («post la venko de socialismo...» k.t.p.), do kun tio, kion vi nomas «bazo» kaj «superstrukturo».

Tiu via aserto estas, interalie, kontraŭa al via opinio, esprimita en la artikolo de la 20-a de Junio 1950, kie vi plurfoje akcentis, ke la lingvo estas socia fenomeno.

*«Naskita ne de tiu, aŭ alia bazo, de la nova aŭ malnova bazo..., sed de la tuta irado de la historio»<sup>2</sup>.*

Kaj vi precizigis tion en la letero al J. Kraŝeninnikova:

*«Mallonge, la lingvon oni rajtas alnombri nek al kategorio de bazoj, nek al kategorio de superstrukturoj»<sup>3</sup>.*

Kial, do, laŭ via opinio, la Internacia Lingvo devus atendi *ad infinitum* ian «novan bazon» kaj ian «novan superstrukturon» por formiĝi kaj ekesti?

(3) En la menciita respondo al J. Kraŝeninnikova, kiu demandis pri la influo de la klasoj sur la lingvon, vi diris, ke la klasoj havas ian influon, ke ili alportas en la lingvon siajn specifajn vortojn kaj esprimojn. Kaj vi daŭrigis:

*«Da tiaj specifaj vortoj kaj esprimoj, kiel ankaŭ da kazoj de diferencoj en la semantiko, estas tiom malmulte en la lingvo, ke ili eble-eble prezentas unu procenton de la tuta lingva materialo. Sekve, la tuta cetera grandega plimulto de vortoj kaj esprimoj, kiel ankaŭ ilia semantiko, estas komuna (substrekis J.V.S.) al ĉiuj klasoj de la socio»<sup>4</sup>.*

La realaĵo estas precize inversa. La plej evoluintaj lingvoj posedas hodiaŭ ĉirkaŭ 400,000 vortojn<sup>5</sup>. Shakespeare — la verkisto la plej riĉa je vortoj — skribis ĉiujn siajn verkojn per iom pli ol 14,000 vortoj. Laŭ la lingvisto M. Müller ankoraŭ en la XIX-a jarcento troviĝis vilaĝoj en Anglujo, en kiuj la kamparanoj ne sciis pli ol 400 vortojn! Meze kleraj homoj posedas kutime 4000-5000 vortojn. Tio signifas, ke la meza individua vortoprovizo estas proksimume 1 procento de la tuta vortaro de iu lingvo. Tio plue pravas, ke la vorta materialo, kiu estas *fakte komuna* al ĉiuj membroj de iu lingva komunajo, inkluzivante do ankaŭ la plej malklerajn tavolojn, estas eĉ multe pli malalta ol 1 procento de la tuta vortoprovizo de la koncerna lingvo. Ĉio alia apartenas al la apartaj ne nur klasoj, sed ankaŭ profesioj, fakoj kaj eĉ flankaj okupoj, kiaj estas la sporto, ludoj k.s.

Kun la evoluo kaj ĉiam pli granda specialigo de la scienco kaj de la tekniko en la lastaj jardekoj, ĝuste tiu «specifa» parto de la nacilingvaj vortaroj trege riĉiĝis. Sed pro la ĉiam pli vigla internacia rilatado, tiu riĉiĝo normale okazadis kaj okazas ĉefe ne plu sur plano nacia, sed multe pli sur plano internacia. Oni povas facile observi tiun procezon de ĝenerala proksimiĝo aŭ — alivorte dirite — internaciigo ne nur de la vorta materialo de diversaj lingvoj, sed ankaŭ de la formoj de esprimado. Escepton faris la hitlera reĝimo kaj la reĝimoj, kiuj ĝin imitis: ili provis artefarite, per politikaj kaj juraj rimedoj, haltigi tiun normalan evoluon.

Tiamaniere okazas, ke eĉ vi mem, en la malgranda parteto, kiun ni ĵus citis, uzis 7 fojojn internaciajn radikojn 4 linioj (ruse: *specifiĉeskij, semantika* (du fojojn), *procent, material, masa, klas*). En via tuta artikolo vi uzis de 10 procentoj ĝis 30 procentoj da internaciaj radikoj depende de la demando, kiun vi preparolis. Se oni malatentus la ofte ripetatajn konjunkciojn, prepoziciojn kaj la plej kutimajn verbojn, kiuj kompreneble ne povas havi internacian karakteron, tiu procento ankoraŭ tre altiĝus.

Cio ĉi signifas, ke:

(a) La lingvoj jam plurajn jarcentojn internaciigas ĉiam pli kaj pli surbaze de la ĝenerala materia kaj spirita evoluo de la homaro. La diversaj politikaj reĝimoj povas por kelka tempo artefarite bremsi tiun evoluon, sed ne povas ĝin haltigi.

(b) Kelkaj branĉoj de la vivo — precipe la scienco kaj tekniko — jam tiom internaciigis ankaŭ lingve, ke specialisto de kiu ajn branĉo povas kun malpli da malfacilaĵoj kompreni verkon el sia fako skribitan en fremda lingvo, ol tiun saman verkon povas kompreni nespecialisto samlingvano. Oni provu legigi ekzemple la parton pri semantiko el via letero al kiu ajn kolhozano kaj oni facile baldaŭ konvinkiĝos pri la vereco de tiu fakto.

(c) Tiu internacia lingvomaterialo prezentas sufiĉe larĝan kaj sufiĉe solidan bazon por konstrui sur ĝi vere internacian lingvon donante al ĝi simplan gramatikan formon. Esence ĝuste tion faris la genia aŭtoro de Esperanto, doktoro L. L. Zamenhof, kies verko malgraŭ la ĉiaspecaj malfacilaĵoj kaj kontraŭstaroj, disvastiĝis tra la tuta mondo.

(4) Kiam vi parolas pri «venko de socialismo», evidente sub «socialismo» vi komprenas la reĝimon, kiu nun ekzistas en Sovetunio kaj kiu — eble kun nuancaj diferencoj — realiĝas en vico da aliaj landoj.

Konsiderante, do, ke sur tiuj larĝaj spacoj — laŭ via aserto — jam devus esti realigita la «egaleco de la nacioj» kaj «likvidita la politiko de subpremo kaj asimilado de la lingvoj», kio estas unu el la manifestiĝoj de la «mondimperialismo», oni devus atendi — denove laŭ via opinio — almenaŭ la komenciĝon de kunfandiĝo de la lingvoj en unu novan «zonan» lingvon, komunan al la nacioj vivantaj sub tiu reĝimo.

Anstataŭ tio, ĉiu povas konstati, ke la rusa lingvo estas devige instruata al milionaj amasoj da nerusaj popoloj. Samtempe la sovetaj lingvistoj proklamas tiun lingvon «instrumento de la plej progresiva civilizacio... de la plej progresiva scienco... lingvo de paco kaj progreso... granda, riĉa kaj potenca» (Prof. Lomtjev en «*Izvestija*» de la 24-a de Majo 1950). Eĉ la nuran eblecon de internacia lingvo en la nuntempo oni atakas kiel esprimon de «kosmopolitismo, ideologio reakcia de la imperialista burĝaro» (*Voprosi filozofiji*, N-ro 2/1949). Oni ne hezitas aparte deklari, ke la rusa lingvo «ne estas nur la lingvo de U.S.S.R., sed ankaŭ la Internacia Lingvo en la popolaj demokratioj» (Prof. Jakovljeviĉ en «*Vjestnik Akademiji Nauk SSSR*», N-ro 2/1950).

Tiuj faktoj — ŝajnas al ni — parolas sufiĉe klare per si mem. Multe pli konvinke ol viaj teoriaj eksplikoj, ili klarigas la verajn kaŭzojn de via negativa starpunkto rilate al la Internacia Lingvo.

Ni tre dubas, ke la faktoj, kiujn ni objektivite prezentis en tiu ĉi letero, igos vin ŝanĝi vian starpunkton. Ne por tiu celo ni skribis al vi. Ni nur deziris klare fiksi nian starpunkton. La plua evoluo de la historio montros kiu pravas.

Londono-Parizo, Majo 1952

**Estraro  
de  
Universala Esperanto-Asocio**

**Plenumkomitato  
de  
Sennacieca Asocio Tutmonda**

1 «*Bolŝevik*» N-ro 14/1950, p. 5-6.

2 «*Bolŝevik*» N-ro 12/1950, p. 2.

3 «*Bolŝevik*» N-ro 12/1950, p. 15.

4 «*Bolŝevik*» N-ro 12/1950, p. 17.

5 La granda «*Oxford Dictionary*» de la angla lingvo enhavas 414,825 vortojn.

# PRI LA INTERNACIA KOMERCA EKONOMIKA VORTARO EN 9 LINGVOJ

---

La misprezento en la artikolo de s-ro B. Vogelmann sur paĝo 26 de Horizonte N-ro 26 igas ĝustigon necesa.

En mia sciigo sur paĝo 16 de Horizonte N-ro 25 mi esprimis ke EKI, laŭ komuniko de la eldonisto, ne kapablas revizii kaj ĝisdatigi la vortaron. Mi siatempe retiris min kiel redaktoron kaj ne nomumis anstataŭanton, tiel ke la eldonisto laŭkontrakte rajtis fari tion. Oni elektis s-ron Wensing, kontraŭ kio mi emfaze, sed vane, avertis. La «rezulto» nun estas konata... S-ro Vogelmann nun klopodas ĝojigi nin, komunikante ke li dume laboras pri novaj eldonoj de la vortaro «en aziaj kaj orient-eŭropaj lingvoj». Sed komencante tiun planon s-ro Vogelmann ne informis min kiel projektinton kaj redaktinton de la verko, se ne paroli pri mia konsento, kiu estas kontrakte necesa. S-ro Vogelmann nun lamentas, krom pri sia aĝo, pri perdo de tempo, mono kaj laboro, kiun oni tamen faris sen mia konsento.

En la nunaj cirkonstancoj mi ne povos doni mian konsenton pro la sekvaj konsideroj:

1) La 9-lingva vortaro estas grava eldono, ĉar pro sia multlingveco — kiu ja signifas vendadon plejparte al ne-esperantistoj sur mondmerkato! — ĝi estas konstanta kaj efektiva propagando por Esperanto. Oni ĉiam atentu la gravecon de tiaj multlingvaj eldonoj en kiuj ankaŭ Esperanto ludas rolon.

Do necesos antaŭ ĉio revizii kaj ĝisdatigi la vortaron kaj reeldoni ĝin en ĝia nuna formo. Estas ja hontinda kaj nescienca reeldoni la verkon sen kritikaj konsidero kaj prilaboro de la vortmaterialo! Post sekurigo de la vortaro sur tiu bazo oni povus pripensi la eblon iom post iom kaj laŭbezone plivastigi ĝin per aliaj lingvoj. Sed nun mi aŭdigu seriozan averton. Oni ja ne povus simple traduki terminojn, ĉar vastasence la sociaj sistemoj en lingvoregionoj kiel la rusa, ĉina, araba kaj pliaj multrilate esence diferencas de tiuj en la «okcidenta mondo». Por prijuĝi la situacion en ekzemple la «socialismaj» landoj oni bezonus grandan ekspertecon kaj sciencan alpaŝon kaj, verdire, tiujn du ecojn mi ne vidas en la nuna Esperanto-movado pri ĉi tiu fako. Oni ja eĉ ne kapablis «nur» ĝisdatigi la originan verkon! Do mi ne povas ne konkludi, ĝis montriĝus la malo, ke la «plano» de s-ro Vogelmann, kiom ajn laŭdinda je la unua tamen supraĵa rigardo, estas diletantisma, ke ĝi fiaskiĝus kaj per tio ruiniĝus ankaŭ la ekzistantan vortaron, kiu jam pruvis sian valoron.

2) Mi neniel volus havi kontakton aŭ intertrakti kun EKI (Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio). Ĉe sia fondiĝo EKI estis institucio de UEA kun statuto formulita interkonsente kun UEA. Tiu statuto interalie kondiĉis ke ŝanĝo en sia enhavo bezonu la aprobon de la UEA-estraro. Malgraŭ tio s-ro Wensing poste simple ŝanĝis la esencon de la EKI-statuto propradecide, do senkonsente kun la tiama UEA-estraro kaj leĝigis tiun falsitan dokumenton fare de notario. S-roj Vogelmann kaj Carlén, la du aliaj EKI-estraranoj, konsciis pri la falsajo, sed ne intervenis. Mi silentu pri la teroro kaj ofendoj kiujn Wensing uzis kontraŭ min en la periodo kiam mi finverkis la vortaron en malfacilaj cirkonstancoj.

Sekve, mi ankaŭ ne povus toleri ke EKI, post la kroma elmontriĝo de sia nekapablo, iel estu plu engaĝita en eventuala plua grupo de kunlaborantoj por daŭrigo de la vortaro. La samo aplikiĝas pri UEA en ĝia nuna situacio.

Obskureco ŝajnas karakteriza pri EKI, ĉar nun s-ro Vogelmann ludas per la penso daŭrigi la laboron por la novaj eldonoj sen mia konsento. Sed li konscias ke li eble havos «multekostan, longtempan, ĉagrenan proceson». La penso ke tia antaŭplanita, kontraŭleĝa malobservo de kontrakto antaŭ ĉio estus *malmorala*, evidente ne estiĝas en lia kapo.

Kelkajn aliajn punktojn, ekz. la «kondiĉojn» de s-ro Vogelmann, mi flankelasis, sed dume mi provizore, tamen detale, konigis miajn vidpunktojn kaj proponojn pri ebla pluekzisto de la 9-lingva vortaro al du elstaraj esperantistoj en la rondo ĉirkaŭ Horizonte.

F. Munniksma (Anglio)

## DANKESPRIMO

Prof. D-ro Miguel Sancho Izquierdo, okaze de sia 90-jariĝo, ricevis amason da leteroj kaj poŝtkartoj kun esprimoj de respekto, simpatio, gratuloj kaj bondeziroj de multnombraj samideanoj kaj geamikoj, ĉiulandaj.

Pro neebleco skribi aparte al ĉiu, li kore dankas ilin, pere de «Horizonto».

La Esperanto-Societo «Frateco» de Zaragoza, organizis je tiu okazo, omaĝe al nia Prezidanto, kelkajn aranĝojn, en sia sidejo kaj publikajn, kiujn partoprenis esperantistoj de Valladolid, Madrid, Valencia kaj San Pablo de Ordal (Barcelona).

La publikaj aranĝoj, konsistis el Kultura Vespero, pri, kaj en Esperanto, en salono de ĉitea Sparkaso. — Prelegis en la hispana pri Esperanto, D-rino M.<sup>a</sup> Rafaela Urueña, prezidantino de la Hispana Esperanto-Federacio, kaj, nia elstara hispana verkistino, kaj kara samideanino, Encarnación Farré, deklamis kaj kantis, akompanate de sia filino, per gitaro, belajn poemojn en Esperanto. — D-ro Sancho Izquierdo rakontis diversajn travivaĵojn de sia esperantista vivo, kaj dankis al ĉiuj. — Je la fino ni translokiĝis al centra restoracio, kie okazis omaĝa bankedo. Entute tre simpatia festo.

La 17-an de junio, Prof. D-ro Miguel Sancho Izquierdo, tagmeze, kunsidis kun sia idaro, konsistanta el gefiloj, genepoj kaj pranepoj, entute 82, el kiuj kelkaj esperantistoj.

### EL NIAJ ORGANIZAĴOJ

#### **PRELEGO PRI LA ESPERANTLINGVA PAROLARTO EN LA UNIVERSITATO DE CAMBRIDGE**

De maldekstre dekstren:  
Prof. L. Elvin, Prof. D-ro  
I. Lapenna, la prezidanto  
de la Grupo Mark Pallen,  
studento de medicino,  
kaj Pastro W. J. Downes.

Foto: Keith Harwood.



La pasintan februaro Prof. D-ro Ivo Lapenna prelegis pri «Retoriko kun Aparta Konsidero al Esperanta Parolarto» en la Esperanto-Grupo de la Universitato de Cambridge, Britio. Krom la gestudentoj, membroj de la Grupo, la prelegon ĉeestis ankaŭ kelkaj gastoj el proksimaj lokoj, inter kiuj Prof. L. Elvin, antaŭe Direktoro de la Departamento pri Edukado de Unesko, kaj la alte respektata membro de la Akademio de Esperanto, Pastro W. J. Downes. Antaŭ la prelego okazis komuna vespermanĝo en unu el la kolegioj kaj post la prelego amika renkontiĝo en la studenta loĝejo de membro de la Grupo. Entute ege sukcesa aranĝo, kiu certe kontribuos al plua laboro de tiu malgranda, sed tre aktiva Esperanto-Grupo en unu el la plej gravaj universitatoj de la mondo.

## STRANGA LOGIKO

De Joaquín María Bartrina

(Vidu n.º 5 de Horizonto,  
sept.-okt. 1976-a)

— Ĉio, ĉio, en la mondfundo  
po kvardek metroj kreskas en sekundo!

Tion-ĉi diradis homo freneza  
al saĝulo irinta lin viziti;  
ĉar tiu frazo ŝajnis tro hereza  
li volis repliki argumente  
kaj la absurdan aserton tuj spliti  
radikale, draste, samamomente  
ĉar formulitan nur malprudente.  
Sed... la manieron li serĉis vane;  
konfuzis lin lia propra racio:  
«Se, kion ni rigardas, kreskus tio,  
kaj la okuloj kreskus tute same,  
laŭ la okuloj kreskus ja nenio».

Li pensis, ke laŭ tiu postulato  
ĉar samaproporcie kreskus ĉio,  
eterne egala estus la rilato  
inter mezuraĵo kaj la mezurilo.

La saĝulo ne povis, absolute,  
rebati tiun diron malracian  
kaj replikis hezite kaj balbute:  
— Kvankam laŭ mi, estas malsaĝe febla  
via asertaĵo ekstravaganca,  
mi ne povas demonstri ĝin maleblan...  
La homa saĝo estas tiel ranca!  
La eterna Dio kreis ĝin tia!  
— Dio ne ekzistas!

— He, vi, malpia!  
Ĉu do vi pruvos ke Dio malestas?  
— Kaj se mi ne povos demonstri tion,  
ĉu ni en la sama kazo ne restas?  
Aŭ, vi volas ke mi akceptu Dion?  
Nu, Dio estas; mi cedas momenton  
ĉar por negi mi ne havas talenton;  
sed rezonante laŭ via logiko  
mi postulas kun sama etiko  
akcepti tiun strangan realon:  
ke ĉio en la mondfundo  
po kvardek metroj kreskas en sekundo  
ĉar vi ja ne povas prui la malon.

El la hispana tradukis

Salvador Gumá

x x  
x x

León Felipe (1884 )

Neniu iris hieraŭ  
nek iras hodiaŭ,  
nek morgaŭ iros  
al Dio  
sur ĉi sama vojo  
kiun mi iras.  
Por ĉiu homo gardas  
novan lumradion la suno...  
kaj virgan vojon  
Dio...

#### FORSTREKITA

Alfonsina Storni (1892-1938)

Kiam mi mortos tagon, la novaĵo  
sekvi devos la praktikon uzatan,  
kaj de oficej' al oficej' promte  
tra la registroj estos mi serĉata.

Kaj jen tre lontane, en vilaĝeto  
subsune dormanta ĉe la montaro,  
sur mia nomo, en olda registro,  
man' de mi ne konata strekon faros.

#### BORDE

Gloria Fuertes (1918- )

Mi estas alta,  
en la milito  
mi pezis eĉ kvardek kilojn.

Mi estis borde de la tuberkulozo,  
borde de la karcero,  
borde de l' amikeco,  
borde de l' arto,  
borde de la sinmortigo,  
borde de la mizerikordo,  
borde de l' envio,  
borde de la famo,  
borde de l' amo,  
borde de la plaĝo,  
kaj poiome mi sentis dormemon,  
kaj jen mi dormas borde,  
borde de la vekigo.

#### KANTO KVIN

Blas de Otero

La Zamorajn pontojn iris  
lante mia anim' sola,  
ne tiun ponton el fero,  
sed l' amatan ponton ŝtonan,  
rigardante foje l' akvon,  
foje la ĉielon fonan.  
La Zamorajn pontojn iris  
lante mia anim' sola.

Tradukoj far: *LIVEN DEK*

# LA ARTO EN LA TAŬROLUDOJ KAJ LA SCIENCO EN LA FUTBALO

Nun, kiam en la gazetoj oni dediĉas tiom da paĝoj al la taŭroludoj kaj la futbalo, ni iom parolu pri tiuj spektakloj por homamasoj: nacia, la unua; internacia, la dua. Komprenoble, mi ne intencas kritike analizi la «feston» nek tiun sportan aktivecon tiel pasian.

La taŭroludoj neniam estis, nek estos, probable, eksporta spektaklo. Nur en tri aŭ kvar hispanamerikaj respublikoj, ekzistas — same kiel en Hispanio — granda entuziasmo por la taŭroludoj kaj sekve, bonaj toreadoroj, kaj ankaŭ en nia najbara lando, en la alia flanko de la Pireneo, sed tie, nur en la landlimaj urboj. Pluraj estas la kaŭzoj, sed la plej grava estas, la rifuzo de spektaklo misfamigita kiel sovaĝa. Tion ĉi ŝajne kontraŭdiras la fakto ke en pluraj el la someraj ferioj la sidlokoj ĉirkaŭ la areno pleniĝas de eksterlandaj turistoj. La plimulto estas allogita de kio por ili estas ekzotika festo, kaj eĉ de tiu ingredienco el barbara tragedio, kio faris el Montherlant kaj el Hemingway esceptajn korifeojn. Personoj, kiuj nur vidas la turmenton de la feroĉa besto, rifuzas la feston kaj ne plu alestas al ĝi. Aliaj, impresitaj de tiu bunta mikso de splendoro kaj koloroj, de gajeco kaj teruro, de la belaspekta taŭro en ĝia kurado kaj en ĝia sturmo, de la kuraĝo kaj de la lerteco de la toreadoroj kaj de tiu impresanta skulptaĵo konsistanta el la toreadoro kaj la besto en la estetika ludo, fine ensorĉiĝas en la spektaklo. Oni diras ke ili ne havas juĝkapablon, sed, ĉu tio gravas?, ili estis kaptitaj de la emocio kaj la beleco de tiu arto, kiu gajnis por la idoloj la admiron kaj la amikecon de multaj intelektuloj kaj inspiris poetojn kaj artistojn tiom aŭ pli, kiom la atletoj inspiris la atenanajn en la pratempo.

Lope de Vega, Tirso de Molina, Ruiz de Alarcón... por kiuj la kavalira lancobatado de la taŭroj en reĝaj festoj estis temo de kelkaj strofoj en romano, jen kiel poemoj, jen kiel parto de iliaj komedioj; ne estis epoko en kiu multaj el la hispanaj poetoj ne vidis en la diversaj aspektoj de la toreado brilan moticon por ke ilia fantazio libere flugu. Sed neniam antaŭe kiel de post F. Villalón ĝis la nuntempo, la arto de la taŭroludoj, de la kamparaj stampoj, popularaj kaj ciganeskaj, de ĉiu okazaĵo en la areno, de la ekzaltado de la toreadoroj en la zenito de iliaj triumfoj kaj en ilia glora sangverŝado sur la areno, enkalkulis tiom da emi-

nentaj kantistoj, kiuj en kompleta gamo de plurkoloraj metaforoj pli bone atingis la fundon de ĉio kion la taŭroj kaj iliaj toreadoroj signifas per si mem, en sia festo kaj sia dramo.

Kiu ne konas la verkon «Llanto por Ignacio Sánchez Mejías» (Ploro al Ignacio Sánchez Mejías) de García Lorca, kiun la universala poeto de Granada dediĉis al tiu, kiu pli multe priploris lin, kaj kiu devenigis sian amon en relikvo: Encarnación López «La Argentinita»?

El la klasikaj rakontistoj, multaj estis la romanistoj kaj raportistoj al kiuj nia nacia festo kaj unuavice ĝiaj protagonistoj inspiris romanojn aŭ raportojn pli-malpli biografiajn de la idoloj. Krom la jam menciitaj Montherlant kaj Hemingwai, el la plej beletra elstareco, ni havas aliajn verkojn, kiujn ni ŝuldas al eksterlandanoj, indajn de nia atento, inter ili la gravan raporton de la franco Jean Cau sub la moto «Las orejas y el rabo» (La oreloj kaj la vosto), kaj «La vivo kaj mirakloj de Manuel Benítez "El Cordobés"», de Dominique Lapiere kaj Larry Collins. Kaj ni ne povas ne menciĝi la verkon «El torero Caracho» de la fama Ramón Gómez de la Serna; nek la kronikojn de la majstraj ĵurnalistoj pri toreado, Mariano de Cavia kaj Gregorio Corrochano; nek la enciklopedian verkon «Los toros» de la akademiano Don José M. de Cossio. Nekalkuleblaj estas la filmoj kaj teatraĵoj, kiuj pli-malpli rilatas taŭrajn tipojn kaj mediojn, el ili elstaras la komedietoj. En la lirika ĝenro la verko plej signifoplena estas «Pan y toros», de Picón kaj Barbieri.

La taŭroludoj en siaj multaj aspektoj kaj perspektivoj, en sia neelĉerpebla gamo de estetika plastiko, luma kaj kolora, de seksa kaj ĝoja defio al la morto kaj de tragika misludo, ne povis ne sugesti la pentristojn. La genio de nia glora samregionano Francisco de Goya, pentristo kiu estis doktoro pri la temo, kaj avangarda figuro, distingigis per la aŭdaca kaj signifoplena plastiko de siaj akvafortoj de la serio «Tauromaquia (Toreado)». Sed ne nur en tiu serio, sed ankaŭ en la portretoj de la monstroj de la epoko, en la frenezaj antaŭ la taŭroj de la populara Martincho sur la areno de Zaragoza kaj en aliaj bildoj temantaj pri ne malpli tipa toreado. Malgraŭ sufiĉe distance same en la tempo kiel en la arto, Marcelino de Unceña populariĝis pro siaj afiŝoj pri taŭroludoj desegnitaj kaj litografiitaj en Zara-

goza. Longa estas la listo de famaj pentristoj de tiu ĉi jarcento, kiuj per malsama vidado laŭ sia sentiveco kaj arta orientiĝo postlasis neforgeseblajn bildojn pri toreadoroj kaj taŭroludaj temoj; Ramón Casas, Roberto Domingo, Ignacio Zuloaga... Pentriston Picasso ni devas menciĝi aparte. Picasso estas aparta. La desegnistoj kaj afiŝdesegnistoj estas legio, inter kiuj veraj artistoj...

Nepardoneble estus forgesi la skulptarton, kaj en tiu ĉi arto ne menciĝi la nomojn de Mariano Benlliure kaj Sebastián Miranda.

Ni parolu pri futbalo, la sporta spektaklo de la XX<sup>a</sup> jarcento, kiu pli vibrigas de entuziasmo kaj pasio la popolojn de la mondo, ĝis tia grado ke la plej grandaj stadionoj jam fariĝis malgrandaj.


Laŭ mia opinio la futbalo havas tiom da scienco kiom malhavas da arto, kompreneble, se la ludantoj ne nur ludas per la piedoj kaj kapfrapoj. Ĝi estas kio pli simila al ŝako, la plej scienca el la ludoj, kun la nura diferenco ke la ludantoj, estas

sur la gazono de la kampoj kiel la ŝakfiguroj sur la ŝaktabulo. Estas fundamenta la fizika fortikeco kaj la rapideco de reagoj, sed kio sufiĉas por ke oni fariĝu bona atleto, ne sufiĉas por ke oni fariĝu unu el tiuj lertaj futbalistoj por kiuj oni pagas milionojn. Tiuj estas, kaj ne povas esti alie, kiuj kunportas rezonan mensan analizon, matematikan pli ol imagan kaj kaprican, de ĉiu ebla movo, en konstanta kaj aktiva kurludo kun la figuroj de sia teamo, kaj pretaj malsukcesigi la movojn de la kontraŭulo. La pordisto estas kvazaŭ la reĝo en la ŝako kaj ĉiu golo estas ŝako! Per tio kaj per la viva mekaniko de la profesiaj futbalistoj submetataj al la rigora disciplino trudata de la trejnistoj, — kio sufokas la homan personecon —, la futbalo, havanta elstarajn kronikistojn, ne havas peetojn kiuj kantas iliajn prodojn, nek artistojn kiuj bildigas la momenton de majstra ludado.

La pied-pilka sporto povas esti priskribita kaj komentita kiel algebra kombino, sed ne ekzaltita de poezia aŭ arta genio.

*Inés Gastón*

## LA AŬTORO RIKARDO ŜULCO PREMIITA



Pro la aktuala poŝlibro pri la solvo de la lingvoproblemo en la landoj de la Eŭropaj komunumoj «EUROPÄISCHE HOCHSPRACHE ODER SPRACHIMPERIALISMUS?» (Eŭropa komuna lingvo aŭ lingva imperialismo?) la aŭtoro Rikardo Sulco, D-4950 Minden, kaj lia eldonisto Hans M. Bleicher, D-7016 Gerlingo, ricevis flanke de la AWMM (Laborkomunumo pri reklamo kaj pri esploro de merkato kaj opinio) la lingvosciencan libropremion «AWMM 1980». La premiado okazis la 3an de Majo en Luksemburgo, kie Rikardo Sulco faris antaŭ la multanombre venintaj membroj de la internacie vaste disbranĉiginta AWMM enkondukan raporton pri la temo de sia libro.

De Rikardo Sulco aperis ĉe la Bleicher-eldonejo i.a. ankaŭ Esperanta traduko de la rakonto «La perdita honoro de iu Katarino Blum'» de Henriko Boelo.

## ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. Ivo Lapenna  
N-ro 20

### 38 LA ESTRARA RAPORTO DE UEA

Ĝis Hamburgo (1974) la *Jarlibro* de UEA estis publikigata en du volumoj de ĉ. 700 paĝoj, ekz. en 1973 kun entute 720 paĝoj, en 1974 kun 671 paĝoj. Post Hamburgo regule aperas nur unu volumo. Tiu de 1979 — la *Jarlibro* por 1980 verŝajne ankoraŭ ne estas publikigita — havis nur 378 paĝojn, t.e. iom pli ol duonon de la duvoluma *Jarlibro* antaŭ Hamburgo: unu el la multaj retroiroj, kiu per si mem okulfrape spegulas la realaĵon, eĉ se oni pro tempomanko aŭ apatio ne emas trastudi la bedaŭrindajn faktojn.

Ĝis Hamburgo la Estrara Raporto aperadis en la Dua Parto de la *Jarlibro* kaj estis plenŝtopita de koncizaj informoj kaj precizaj statistikoj pri la farita laboro, atingoj en la realigado de la laborprogramoj (nun ne plu ekzistantaj) kaj konkretaj agadplanoj por la estonteco surbaze de realecaj analizoj de la faritaj progresoj. Post Hamburgo la Estrara Raporto aperas en la revuo *Esperanto*, kio, interalie, senigas la membrojn-abonantojn de preskaŭ unu tuta numero de tiu periodaĵo.

La Estrara Raporto por 1979-80 estas publikigita en n-ro 5/80 de *Esperanto*. Se oni esceptas la rutinajn informojn pri administrado kaj financoj, restas kiel objektivaj pozitivaj eroj nur la ĝisdatigita publikigado de la revuo, la *Jarlibro*, la okazigo de la Universala Kongreso en Lucerno kaj la bona funkciado de la libroservo. Nepardoneble kaj verŝajne neripareble negativa estis la akcepto de la nova, kontraŭneŭtraleca Statuto de la Asocio. Pluraj aktivadoj sur la kampo de kulturo kaj edukado aŭ sur landa kaj regiona niveloj, menciitaj en la Raporto, fakte ŝuldiĝas ne al la gvidaj organoj de UEA, sed al aliaj instancoj, kelkaj tute ekster UEA. Ĉio cetera estas grandparte senenhava eltirniĝado kaj promesoj por la estonteco, kiuj jam teĉe ĉiujare ripetigis ekde Hamburgo, sed neniam realiĝas.

La tuta agado de la gvidaj organoj de UEA en la 6-jara periodo 1974-1980 estos iom detale analizita en unu el la sekvantaj numeroj de *Horizonto*. Ĉi tie estu nur menciite, ke en 1979 la sumo de ĉiuj membroj estis 30.871 kompare kun 31.947 en 1978 kaj kun 33.716 en 1973 (la lasta antaŭ Hamburgo); la nombro de individuaj membroj en 1979 estis 6.278 kompare kun 6.222 en 1978 kaj kun 7.302 en 1973. Do, perdo de 2.647 membroj entute malgraŭ la akcepto de kontraŭneŭtralecaj instancoj kiel aliĝintaj asocioj kaj, eĉ pli grave, neta perdo de 1.024 individuaj membroj, kiuj formas la kernan parton de UEA.

*Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.7 de EeP.*

### 39. DEKLARO PRI NEŬTRALECO DE KANDIDATO AL KOMITATANECO B

En UEA nun okazas la elekto de Komitatoj B. Entute estas 9 kandidatoj kaj povas esti elektitaj nur 7: ne tre granda «vastigo de la rajtoj» de la individuaj membroj kompare kun la rajtoj, kiujn ili devis ricevi, kaj kompare kun la bombastaj promesoj de la nuna gvidantaro. Nur unu el la kandidatoj, agregaciulo F. Simonet, deklaris sin fidela al la partipolitika neŭtraleco de UEA. Jen parto de lia deklaro sendita al la voĉdonantoj kune kun la deklaroj de la aliaj kandidatoj:

*«Komitatano B de 1977, mi levadis la voĉon unuavice defende al la neŭtraleco de UEA (en ties tuto, kiom eblas, ne nur en la centraj organoj), nepra kondiĉo por ĝiaj sendependeco kaj universaleco; por ankaŭ aliflanka respekto al la Statuto, kaj seriozeco de la komitata laborado. Mi konstatis oftan malatenton de tiuj esencaj principoj ĉe multaj komitatoj, kaj ĉe la Estraro almenaŭ ŝanceliĝemon. Ne voĉdonu por mi, se vi kredas, ke ĉio estis en ordo tiurilate dum la lastaj jaroj. Ne voĉdonu por mi, se vi pretas fari el UEA, aŭ konsenti, ke aliaj faru el ĝi, ilon je la servo de iu ajn politika movado (aŭ batalilon kontraŭ iun ajn).»*

S-ro F. Simonet estas 40-jara parizano, agregaciulo pri gramatiko kaj instruis diverslande, plej longe kiel profesoro en la Sajgona/Hoĉiminurba Universitato (1971-1976), nun ĉe la Moskva Universitato. Li estas denaska esperantisto, internacie aktiva ekde 1962, precipe en TEJO kaj STELO, dumviva membro kaj fakdelegito de UEA.

Estos interese vidi, ĉu tia sincera esperantisto, kiu ekde 1977 luktas en la Komitato de UEA por la neŭtraleco de la Asocio, bedaŭrinde sen rimarkebla sukceso, estos reelektita kaj, se jes, per kiom da voĉoj. En ĉiu okazo, ĉu elektita aŭ ne, liaj kuraĝo kaj sindono meritas dankon de ĉiuj sinceraj esperantistoj, por kiuj la sorto de UEA ne estas indiferenta.

En *der esperantist*, organo de la Centra Laborrondo-Esperanto en GDR, siavice «aliĝinta asocio de UEA», aperis en n-ro 2/80 sur la unua paĝo plia atako kontraŭ Usonon kaj aliajn NATO-Statojn. Temas pri Rezolucio de la 10-a de februaro 1980, akceptita de la 10-a Kunsido de CLE. En ĝi la partoprenintoj ripročas «la sabotadon de la SALT-II-Traktato, la bojkotcelan agitadon kontraŭ la Olimpikaj Ludoj kaj la diversajn lastatem-pajn paŝojn de la Carter Administracio kaj de aliaj NATO-Ŝtatoj». La partoprenintoj vidas en tio «danĝeran provon torpetadi la politikon de la paca kunekzistado, de malar-mado kaj malstreĉiĝo». Tial ili deklaris sian «firman volon» per ĉiuj siaj fortoj kaj per la «specifaj eblecoj de la Internacia Lingvo-Esperanto subteni la pacpolitikon de Sovetunio kaj konsekvence de ĝi realigatan...». Eĉ ne unu vorto pri la «pacpolitika» agreso de Soveta Unio en Afganio, agreso, kiu provokis la nunan bedaŭrindan streĉitecon en la internaciaj rilatoj kaj la demokratian decidon de multaj naciaj olimpikaj komitatoj kaj de individuaj sportistoj ne partopreni la Olimpikojn en Moskvo.

Tiu ĉi rubriko tute ne tuŝus la supran demandon, se organo de «aliĝinta landa asocio» ne faradus tian vulgaran partipolitikan propagandon.

*Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1.2 de EeP.*

## KION VI NE LEGOS ALILOKE

## NEOBJEKTIVA RECENZO PLENA DE ERAROJ KAJ ANTAŬJUĜOJ

*Noto: Fine de 1979 mi ricevis n-ran 1/79 de «Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado», verŝajne la lasta ĝis nun aperinta de tiu periodaĵo, kiu ekde Hamburgo (1974) estis publikigata tre neregule. En ĝi troviĝas 4-paĝa franclingva recenzo de M. Duc Goninaz pri Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo. La aŭtoro estas asistento en la Universitato de Provence (Francio), kie li instruas la rusan kaj Esperanton. Li estas ankaŭ membro de la redakta komitato de la menciita periodaĵo. La 26-an de decembro 1979 mi sendis al la redaktoro de la revuo reagan leteron kun la peto informi min ĉu li intencas publikigi ĝin aŭ ne. Pasis pli ol ses monatoj, sed, surprize por rilatoj inter civilizitaj personoj, precipe en universitataj rondoj, venis nenia respondo. Oni, do, devas supozi, ke aŭ la revuo entute ne plu aperadas, aŭ ke la redaktoro ne plu interesiĝas pri ĝi. En tiaj cirkonstancoj mi decidiĝis publikigi la leteron en Horizonto. Sube aperas la kompleta teksto. I. L.*

D-ro Richard E. Wood,  
Dept. of English,  
Southeast Missouri State University,  
Cape Girardeau, MO 63701,  
Usono.

La 26-an de decembro 1979

Kopie al D-ro U. Lins

Estimata Redaktoro,

Oni sendis al mi n-ran 1/1979 de «*Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado*» — mistradukita en la franca per «*Problèmes de politique linguistique*» — en kiu troviĝas recenzo pri la verko *Esperanto en Perspektivo*. Verŝajne tion faris la C.O. de UEA laŭ via konsilo.

En mia tre longa akademia kariero mi neniam legis tian neobjektivan recenzon, plenan de eraroj bazitaj sur antaŭjuĝoj. Ankaŭ neniam ĝis nun okazis, ke mi sentus la bezonon reagi en kiu ajn senco. Nur la nuna recenzo postulas komenton.

Jam la titolo de la verko enhavas eraron. La titolo ne estas nur «*Esperanto en Perspektivo*», sed ankaŭ «*Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo*». Nur tiu kompleta titolo reflektas la enhavon kaj ĉelojn de la libro. Plue, ĉiu serioza recenzo en kiu ajn iom serioza periodaĵo enhavas en la titolo mem la nomon de la aŭtoro. En tiu ĉi kazo devis esti menciitaj la nomoj de la tri aŭtoroj kun indiko pri la ĉefredaktoro kaj redak-

toro. Tio estas komplete ellasita. Eĉ en la teksto mem ne estas menciite, ke mi kiel ĉefredaktoro redaktis la tutan verkon kun la helpo de Ulrich Lins. Se la recenzinto deziris menciĝi miajn antaŭajn funkciojn en la Esperanto-Movado, li povis glate ellasi mian prezidantecon en UEA, sed li povis, en tia kunteksto verŝajne eĉ devis, menciĝi mian honorifican direktorecon de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo ekde ĝia fondiĝo en 1952 ĝis la fino de 1974, kiel ankaŭ la fakton, ke mi mem estis ne nur fondinto de tiu institucio, sed ankaŭ fondinto de la periodaĵo «*La Monda Lingvo-Problemo*», nun redaktata de vi sub ŝanĝita titolo.

La recenzinto kritikis la kvazaŭan nekoherencecon de la plano kaj la malekvilibron inter la traktitaj temoj. Li esprimas la opinion, ke tio ŝuldiĝas al la divido de la laboro inter la tri aŭtoroj. Efektive, kvankam la divido de laboro en tiaj kolektivaj verkoj ĉiam kaŭzas grandajn malfacilaĵojn, en tiu ĉi kazo pligrandigitajn pro la fakto, ke la tri ĉefaj aŭtoroj loĝis en tri landoj, tamen la malfacilaĵoj estis sukcese venkitaj per abunda korespondado kaj personaj renkontiĝoj inter la ĉefredaktoro kaj redaktoro. La recenzinto verŝajne eĉ ne legis la tutan verkon, precipe ne la Antaŭparolon, en kiu estis klare prezentitaj la celoj de la verko, kiuj difinis ĝiajn enhavon kaj strukturon. La du ĉefaj taskoj estis (I) prezenti la multflankajn aspektojn de la interlingva problemoj en la nuntempa mondo kaj la rezultojn atingitajn en la Internacia Lingvo kaj pere de ĝi, kaj (II) doni en la manojn de la aktivuloj materialojn por efika agado. Tial la interna strukturo estas tia, ke ne nur la tuta verko, sed ankaŭ unuopaj ĉapitroj, sekcioj eĉ subsekcioj prezentigas kiel tutoj, facile kaj preskaŭ senŝange tradukeblaj aŭ uzeblaj por aliaj celoj (prelegoj, dokumentado ktp.) direktitaj al la solvo de la lingva problemoj per Esperanto. La recenzinto riproĉas, ke diversaj eroj estas menciitaj plurfoje en la libro. Efektive, eĉ en verkoj, kiu ne havas la menciitajn celojn, ĉiam okazas — kaj ne povas ne okazi — tiaspecaj ripetigoj en malsamaj kunteksto. Sufiĉas trafolumi indeksojn de kiu ajn scienca verko por konstati tion. Sed en tiu ĉi kazo, ĝuste pro la menciitaj celoj, certagrade tio estas farita intence, aŭ, kiel eksplicite dirite sur p. XXVIII de la Antaŭparolo, «pluraj aferoj estas menciitaj aŭ traktitaj en diversaj lokoj, en iuj pli detale ol en aliaj». Ĝuste tiu struktura aspekto de la verko postulis de mi amason da laboro — eĉ pli ol la verkado de mia propra parto — kaj ĝi donas al la verko la plian intencitan valoron en la lumo de ĝiaj celoj.

La recenzinto eĉ riproĉas, ke la orientiĝoj kaj agadprogramoj de UEA esprimas miajn personajn opiniojn. Unue, tio estas malĝusta, ĉar miaj «personaj opinioj» ĉiam transformiĝis en efektivajn agadojn nur post kiam ili estis akceptitaj de la kompetentaj organoj de UEA. Due, ĉu do la recenzinto estus pli feliĉa, se mi esprimus ne miajn, sed alies opiniojn? Fine, en ĉiu okazo, agante konforme al tiuj «opinioj» UEA konsiderinde progresis kaj atingis multnombrajn pozitivajn rezultojn por la Internacia Lingvo en la postmilita periodo ĝis 1974. Ke en tiu ascenda linio solvado de organiza problemoj ludis decide gravan rolon povas adekvate kompreni nur persono, kiu konscias pri la signifo de taŭge planitaj kaj laŭgrade realigitaj agadoj, neimageblaj sen adekvataj organiza formoj. Estas eraro de la recenzinto, ne de la aŭtoro, se li tion ne komprenas.

La recenzinto aparte riproĉas la foreston de «serioza priskribo de la strukturo de la lingvo». Fakte, la strukturo de Esperanto estas pli ol abunde prezentita en multnombraj verkoj, antaŭ ĉio en la *Plena Gramatiko* de Kalocsay kaj Waringhien. Tial, plia prezento estus absolute superflua balasto, kiu grandigus la verkon je pliaj 300-400 paĝoj. La tezoj prezentitaj en la unua parto de *Retoriko* — kaj en multaj aliaj studoj, artikoloj kaj dokumentoj de CED — estas nur resume prezentitaj en ĉap. 2 kun klara referenco al la koncernaj partoj de *Retoriko*. Mi plu opinias, ke tiuj tezoj, inkluzive mian kvazaŭe «simplistan» teorion pri la «tri aspektoj» — fakte tri esencaj aspektoj de la socia aparteno de la nuntempa homo — estas ĝustaj. Se oni esceptas tiajn pure abstraktajn «kritikojn», neniu, laŭ mia scio, ĝis nun sukcesis pruvi, ke ili estas malĝustaj.

La recenzinto asertas, ke la verko reduktas la Esperanto-Movadon al agadoj direktitaj de UEA. Tio tutsimple estas malvera. Tre grandaj partoj de la verko estas dediĉitaj al multnombraj agadoj ekster UEA kaj neniel sub ĝia kontrolo. Interalie, unu tuta ĉapitro estas plena de informoj pri la historio, strukturo kaj agadoj de SAT. Alia afero estas, ke objektive UEA ekde sia fondiĝo estis la ĉefa organiza forto en la agadoj por la Internacia Lingvo. Tio precipe rilatas al la periodo ekde 1948 ĝis 1974, kion la recenzinto nomas «sistema glorigo» de UEA. Se entute la esprimo «glorigo» estas aplikebla en tia kunteksto, do la faktoj glorigas la agadojn de UEA en tiu periodo, certe ne la prezento de la faktoj, pli ol modesta kompare kun la amplekso de la ĉiudirektaj agadoj.

Estus facile komenti pliajn asertojn en tiu «recenzo», laŭ mia scio unika en la akademio mondo, sed la letero jam fariĝis tro longa. Tamen ankoraŭ nur unu plia punkto. Pro siaj antaŭjuĝoj la recenzinto estas tiel blindigita, ke li ne hezitas riproĉi eĉ la fakton, ke la verko «tro reflektas UEA de antaŭ la Kongreso de Hamburgo de 1974». Kion do li volus? Ĉu li fakte atendas, ke verko publikigita en 1974 «reflektu» la okazaĵojn en

UEA post 1974? Li ankaŭ asertas, ke la verko bezonas kompletigojn. Kompreneble, ke ĝi bezonas. Tio estis antaŭvidita. En la Antaŭparolo estis eksplicite dirite: «CED sekvas la evoluon kaj daŭrigos publikigadi la rezultojn de siaj esploroj kaj studoj ĉu en formo de dokumentoj en la serio *Dokumentaro de CED*, ĉu en tiu de artikoloj en la periodaĵo *La Monda Lingvo-Problemo*. Per tiu agado CED intencas konstante kompletigadi la verkon». Ne kulpas la ĉefredaktoro, ke tiu promeso ne estas plenumata.

Kun estimo

sincere via

*D-ro Lapenna*

---

MALLONGE

## RICEVITAJ BROŜUROJ

«Nederlando koncize». Tre interesa broŝuro eldonita de la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj. Formato, 16,5 × 22 cm. - 48 paĝoj, bele prezentita, plurkolore ilustrita. La teksto donas klaran bildon pri la lando.

Surprize ni ricevis numerojn 73-80 kaj 81-90 de «TAMTAMO 1978» kaj «TAMTAMO 1979», Tesaloniko, Greklando. Ili venis libroforme. 12 × 16,5 cm., 128 kaj 158 paĝaj respektive. Mi diras ke ni ricevis ilin surprize, unue pro ilia agrabla nova vesto kaj due, ĉar jam de longe ni ne ricevis ilin.

«vestFALIAJ flugFOLIOJ». Eldonitaj de R. Schulz, Mindeno, Germanujo RF. Temas pri literaturaj komentoj kompilitaj kaj plej parte verkitaĵ de S-ro Schulz.

---

## EN LA 18-a DE MAJO, TAGO DE BONA VOLO

Unu plian fojon la junularo de Kimrujo sendis por la junularo de la mondo, sian jaran mesaĝon de bona volo, okaze de la 18-a de majo 1980.

Ni kore dankas al la Junuloj de Kimrujo ilian mesaĝon kaj sincere deziras al ili grandan sukceson en ilia homana laboro. — Ke via Bonvolmesaĝo alportu forton por ke la komuna saĝo estu la kverko, de la libera vojo al interkompreniĝo, por ke la verda stelo brilu en la kvin kontinentoj, evidenta signo de la universaleco de la Internacia Lingvo ESPERANTO!

Kiel ĉiujare, la 59-a Bonvolmesaĝo estis radie disaŭdigita la 18-an de majo 1980, en Zaragoza (Hispanujo), en la hispana, kaj ĉijare ankaŭ en Esperanto per «Radio Popular» (Populara Radio) de Zaragoza, dum ĝia Esperanto-programo.

Denove, koran dankon kaj bondezirojn!

*Inés Gastón*

DONACOJ POR «HORIZONTO» 1980	
<i>Ĝisnuna sumo</i> ... ..	22.689 ptoj.
Anonime, Berlino (RF Germanujo) . . .	19.755 »
Georg Harlein, Nurnberg (Germanujo). .	225 »
«Anonime», Berlin West . . . . .	15.839 »
	58.508 »

# INTERNACIA KIBERNETIKA ASOCIO

Kiel informite en «Horizonto» (N.º 1-1980), la 19an de januaro ĉijara, dum la estrarkunsido de la Internacia Kibernetika Asocio ekestis la fina decido, ke la Internacia Lingvo estu akceptata kiel oficiala, tria lingvo de la kongreso por ĉiuj eroj de la programkajero, la korespondado, la avertiloj surlokaj, ktp. — Mankas nur statutŝanĝo certiganta, ke ankaŭ estonte la Internacia Lingvo estu la samranga tria lingvo de IKA. Pri tio oni decidis dum la ĉefkunveno de IKA en Namur dum la kongreso.

## IXa INTERNACIA KONGRESO DE KIBERNETIKO

Namur (B), 8/13 - 9 - 1980

La Internacia Kibernetika Asocio estas organizanta la IXan Internacian Kongreson de Kibernetiko. Ĝi okazos sub la Honora Prezidanteco de la Gubernatoro de la provinco Namur.

### *Temoj de la kongresaj sekcioj*

1. Principoj de la kibernetiko kaj de la ĝenerala teorio de sistemoj.  
La kibernetiko kiel instruado lerneja kaj universitata.
2. La kibernetiko en la prihomaj sciencoj.
3. La kibernetiko en la inĝenieraj sciencoj.
4. Biokibernetiko kaj kibernetika medicino.

### *Tri simpozioj*

- I. Kibernetiko kaj programaro.
- II. Nocio de tempo kaj kibernetiko.
- III. La kibernetiko de la homa lingvo. — 3.<sup>a</sup> Internacia Konferenco pri la Lingvaj Problemoj en la sciencoj. (Okazigota kunlabore kun Eŭropa Klubo — Societo pri lingvolim-transpaŝa eŭropa interkompreniĝo).

### *Organizaj sciigoj*

La kongreso konsistos el: la inaŭguro, laborkunsidoj en sekcioj resp. simpozioj, ferma kunveno. La detala programo estos sendata bontempe al la partoprenontoj. La oficialaj lingvoj de la kongreso estas la franca, la angla kaj la internacia.

### *Aliĝo*

La aliĝilo estas sendenda de la prelegontoj, kiuj uzos la Internacian Lingvon, same kiel de membroj de Eŭropa Klubo, al Institut für Kybernetik (Kleinenberger Weg 16 B, D-4790 Paderborn, FR Germanio), de ĉiuj aliaj rekte al la sekretario de la Internacia Kibernetika Asocio (Palais des Expositions, Place André Rijckmans, B-5000 Namur, Belgio).

### *Kongreskotizo*

(Pagenda samtempe kun la aliĝo) Membroj de la Internacia Kibernetika Asocio: 1000 belgaj frankoj. Aliaj partoprenontoj: 2000 belgaj frankoj. (Specialaj kondiĉoj en la pago de kolektiva aliĝo pere de Institut für Kybernetik.) *Aliĝo ne ekvalidas antaŭ la pago de la kongreskotizo!*

—oOO—

Okazos akceptoj kaj bankedo, prezentos sin kibernetikaj institucioj (institutoj, societoj kaj revuoj), kaj eblos dum libera vespero viziti la mondfaman Cirkon de Moskvo, kiu samtempe gastigos en Namur.

Ĉiu Esperantisto, kiu pretas helpi la enkondukon de la Internacia Lingvo kiel samranga kongreslingvon de ne-Esperantistaj sciencaj kongresoj, subtenu la koncernan proponon de Prof. d-ro Helmar FRANK. Pri ĝi decidos la membrokunveno de la Internacia Kibernetika Asocio, al kiu ĉiu rajtas aliĝi, sabaton, la 13-an de septembro en Namur. Membroj, kiuj ne ĉeestos, rajtas transdoni siajn voĉojn al ĉeestontaj membroj. La jar-kotizo por 1980 estas nur 700 belgaj frankoj. Pliajn informojn donos laŭpete la centra oficejo de Eŭropa Klubo aŭ, dum la Strasburga NEM-konferenco, profesoro Frank persone.

## ESPERANTO EN RADIO

Generalaj informoj pri diversaj disaŭdigoj en Esperanto. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich.

### *Pola Radio* — Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200 m (1502 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 48.90 m (6135 kHz), 41.27 m (7270 kHz).

15.30-16.00 Varsovio, 41.99 m (7145 kHz), 31.45 m (9540 kHz), 31.01 m (9675 kHz).

21.30-22.00 Varsovio, 200 m (1502 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 48.90 m (6135 kHz).

Pola Radio, Esperanto-Redakcio Poŝtkesto 46, P1-00950 Warszawa, Pollando.

### *Radio Roma* — Dimanĉe

20.00-20.20 Romo, 49.92 m (6010 kHz), 41.24 m (7275 kHz), 41.15 m (7290 kHz).

Radio Roma, Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italujo.

### *Svisa Radio Internacia* — Ses tagoj semajne

Lunde, Merkrede kaj Vendrede je 13.20 - 13.30 kaj Marde, Jaude kaj Sabate je 22.35-22.45 mezeŭropa tempo. Por la tempo de Greenwich unu horon pli frue.

### *Radio Vatikana* — Dimanĉe 21.05-21.15, Jaŭde 7.15-7.30

Mezlonga ondo (ĉiudirekten: kHz 1529) kaj sur la kurtondoj: kHz 6190, 7250 kaj 9645, en la direkto de Eŭropo. kHz 9625, 11705 kaj 15120 en la direkto sud Afriko. Radio Vaticana, Esperanto-redakcio, 00120 Città del Vaticano.

### *Radio Vieno* — Sabate, Dimanĉe

16.45-16.55, sabate, Vieno, 48.74 m (6155 kHz), 16.87 m (17.780 kHz).

05.45-05.55, dimanĉe, Vieno, 48.74 m (6155 kHz), 41.64 m (7205 kHz), 16.85 m (17.800 kHz).

Esperanto-Redakcio de ORF, P.O. Box 70J, A-1041 Wien, Austria.

### *Radio Zagreb* — Marde

23.45-24.00, Zagrebo, 264 m (1163 kHz). Radio Zagreb, Esperanto-Fako, Jugoslavio.

### *Radio Sabadell* — Merkrede

21.00-21.15, Sabadell, 203 m (1475 kHz). Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanujo.

### *Radio la Voz de Valencia* — Vendrede

23.00-23.15, Valencio, 358 m (836 kHz), La Voz de Valencia, Hispanujo.

### *Populara Radio de Zaragoza* — Marde

22.30-23.00, Zaragoza, Mezlonga ondo (1134 kHz) mod. frekv. (97,8 MHz).

Radio Popular, Esperanto, Poŝtkesto 322, Zaragoza, Hispanujo.

### *Radio Clube de Sorocaba* — Lunde

00.00-01.00, Sorocaba, 278 m (1080 kHz). Radio Clube de Sorocaba, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba, Brazilo.

### *Radio Pekino* — Dimanĉe, Vendrede, Sabate

11.00-11.30, dimanĉe, Pekino, 47 m, 40 m, 30 m.

12.30-13.00, Pekino, 30 m, 25 m, 19 m.

20.00-20.30, vendrede, Pekino, 43 m, 33 m, 31 m, 25 m.

11.00-11.30, sabate, Pekino, kiel dimanĉe.

12.30-13.00, Pekino, kiel dimanĉe.

20.00-20.30, Pekino, kiel vendrede. Radio Pekino, Esperanto-Fako, Pekino, Pop. Resp. Ĉinio.

## LA INGENIA HIDALGO DON QUIJOTE DE LA MANCHA

Tiu ĉi grava verko aperis en eldono «Fundación Esperanto» de Hispana Esperanto-Federacio (Eldona Fako) Zaragoza. 820 paĝoj, formato 17,5 × 25 cm, ilustrita, bindita. Prezo: 2.500 pesetoj plus 10 % por sendokostoj.

Havebla ĉe F. E. Sekr. Inés Gastón, P.º de la Constitución, 35, 4.º dcha. Zaragoza-1, Hispanujo, aŭ ĉe via libroservo.

# VI-a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Strasburgo, Francujo, 26/7 ĝis 1/8 1980

Konstanta adreso: S-ino M. Muller, 80, Bd. Clémenceau, 67000 Strasburgo

## LASTAJ INFORMOJ PRI LA PROGRAMO

En la antaŭa numero de *Horizonto* aperis jam granda parto de la Konferenca programo. Nun sekvas pliaj informoj:

La Inaŭguran Paroladon faros Prof. D-ro Ivo Lapenna, profesoro pri kompara Soveta kaj orient-eŭropa juro en la Universitato de Londono, sub titolo: «La idea signifo de la Internacia Lingvo — Respondo al la Soveta koncepto ke Esperanto havas nenian idean aspekton».

Plue, okazos la jenaj Enkondukoj sekvotaj de debatoj:

«Orientigaj ideoj de debato pri la temo: 'Lingvodiverseco kiel obstaklo al kreo de Eŭropa konscio'», fare de J. Thierry, Francujo;

«Esperanto kaj la problemoj de tradukado» — Enkonduko de H. Dieter Maas, Germanujo;

«Eĉ sciencistoj suferas pro lingvo-diverseco» — Enkonduko de Prof. Oton Pancer, Jugoslavio;

«Propono de tempo-plano por neŭtrala solvo de lingvoproblemo en la Eŭropa Unio» — Enkonduko de Prof. D-ro Helmar Frank, Germanujo;

«Orientigaj ideoj de debato pri la temo: 'La stato de la Esperanto-Movado en 1980 kaj la rolo de N.E.M.'», fare de Prof. D-ro Ivo Lapenna, Britujo.

Okazos diskuto pri la temo: «La rolo de la Akademio por protekti la lingvan unuecon surbaze de la Fundamento».

Pli ol unu tago estas rezervita por Generala Kunveno. Ĉiuj konferencanoj povos partopreni la diskutojn. Voĉdonrajton havos tiuj, kiuj akceptas kiel devigan por si la Deklaron de Principoj<sup>1)</sup> kaj estas abonantoj de la revuo *Horizonto* almenaŭ ekde komenco de la pasinta jaro.

Krom la jam publikigitaj ekskursoj la konferencanoj faros viziton al la fama Palaco de Eŭropo, sidejo i.a. de la unua elektita Eŭropa Parlamento, kaj ili ĉeestos prezentadon «Sono kaj Lumo» en la Strasburga Katedralo.

La kompletan programon de horo al horo la partoprenantoj ricevos kiel kutime en la dokumentaro je alveno en la Akceptejo.

Aliĝis pli ol 100 personoj el 15 landoj kaj 3 kontinentoj.

*M. Muller*

Prez. de la Loka Organiza Komitato

<sup>1)</sup> Deklaro de Principoj: «El ĉiuj projektoj de komuna lingvo nur Esperanto transformiĝis en vivantan lingvon de vivanta komunajo. Tiu komunajo havas la moralan devon konservi ekster ĉiu ajn ideologio aŭ fremda idearo la neŭtrale homan kulturan karakteron de la Zamenhofa Esperanto kaj de la humaneca inter-naciismo esence ligita al ĝi».